



# BRAZILA ESPERANTISTO

77-a Jaro

Aprilo-Junio 1983

N-ro 277



Aprilo-Junio 1983

77-a Jaro

N-ro 277

**Brazila Esperantisto**  
**("O Esperantista Brasileiro")**

Oficiala organo de Brazila Esperanto-Ligo,  
societo de publika utileco, laŭ registara  
dekreto n-ro 4.356, 26/10/1921

Respondeca Direktoro: Fernando Marinho  
Redaktoro: Luiz A. B. Martins

Administracio kaj Redakcio  
Praça da República, 54 - 2º  
20211 - Rio de Janeiro, RJ, Brazilo

Senpaga por anoj de B.E.L.  
Eksterlande: 10 respondkuponoj



## LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

### Balancete 1981

#### ATIVO

##### Disponível

|                    |            |
|--------------------|------------|
| Caixa              | 117.421,40 |
| Bancos c/Movimento | 200.287,87 |

##### Realizável

|                              |            |
|------------------------------|------------|
| Devedores diversos           | 54.300,50  |
| Devedores p/reembolso postal | 18.293,30  |
| Livros                       | 918.761,00 |
| Ações                        | 2.206,00   |

##### Imobilizado

|                     |              |
|---------------------|--------------|
| Biblioteca          | 6.830,00     |
| Móveis e Utensílios | 10.770,00    |
| Máquinas            | 13.910,00    |
|                     | <hr/>        |
|                     | 1.342.780,07 |

#### PASSIVO

##### Exigível

|                   |            |
|-------------------|------------|
| Credores diversos | 549.582,37 |
|-------------------|------------|

##### Pendentes

|                       |            |
|-----------------------|------------|
| Anuidades antecipadas | 116.000,00 |
|-----------------------|------------|

##### Não Exigível

|            |              |
|------------|--------------|
| Patrimônio | 677.197,70   |
|            | <hr/>        |
|            | 1.342.780,07 |

Rio de Janeiro, 31 de dezembro de 1981

Aloísio Sartorato  
Tesoureiro

Sylla Chaves  
Presidente

## Liga Brasileira de Esperanto

### Quota anual de adesão 1983

M S categoria destinada aos que não são esperantistas mas simpatizam com o movimento, o sócio tem direito a utilizar a Biblioteca e o serviço de livros, participar das atividades sociais e receber os boletins editados pela Liga. Inscrição:

|                  |               |
|------------------|---------------|
| a) até 30/06/83  | Cr\$ 1.000,00 |
| b) após 30/06/83 | Cr\$ 1.500,00 |

M 1 categoria destinada àqueles que já estão integrados no movimento esperantista; recebe o mesmo que o M S. Inscrição:

|                  |               |
|------------------|---------------|
| a) até 30/06/83  | Cr\$ 3.000,00 |
| b) após 30/06/83 | Cr\$ 4.500,00 |

M 2 tem os mesmos direitos que o M 1. Paga uma quota mais alta para auxiliar a B.E.L. e o movimento. Inscrição:

|                  |                |
|------------------|----------------|
| a) até 30/06/83  | Cr\$ 9.000,00  |
| b) após 30/06/83 | Cr\$ 13.500,00 |

D M categoria destinada àqueles que desejam integrar o quadro social da Liga na qualidade de Membro Vitalício. Paga a importância correspondente a 30 vezes o valor da quota M 1. Tem os mesmos direitos que o M 2. Pagamento:

|                  |                 |
|------------------|-----------------|
| a) até 30/06/83  | Cr\$ 90.000,00  |
| b) após 30/06/83 | Cr\$ 135.000,00 |

Todas as importâncias devem ser remetidas, em cheque pagável no Rio de Janeiro, ou vale postal, em nome da Liga Brasileira de Esperanto: Praça da República, 54 - 2º andar, 20.211 - Rio de Janeiro, RJ.

### Curso por Correspondência

A Liga Brasileira de Esperanto mantém os seguintes cursos por correspondência: básico, de aperfeiçoamento, superior e magistral.

#### Taxa de inscrição:

|                  |               |
|------------------|---------------|
| a) até 30/06/83  | Cr\$ 6.000,00 |
| b) após 30/06/83 | Cr\$ 9.000,00 |

A taxa de inscrição é a mesma para todos os cursos.

Os cursos são privativos dos sócios da Liga.

A inscrição para os cursos por correspondência poderá ser feita em qualquer época do ano.

# Ĝenerala Laborplano por Brazila Esperanto-Ligo

(1982 – 1985)

La nuna Estraro de B.E.L. estis elektita en Decembro 1981 por la oficperiodo 1982-1985. Sed la tiama prezidanto D-ro Sylla Chaves akceptis resti en la prezidanteco ĝis la prezento de la bilanco rilata al la jaro 1981, kio okazis fine de 1982.

Sekve dum tuta jaro S-ro Fernando Marinho agadis kiel ĝenerala sekretario de la foriranta Estraro kaj kiel prezidanto de la eniranta Estraro. Kompreneble tiu ĉi nekutima duobla situacio portis kelkokaze embarason al S-ro Marinho: se en difinita okazo li deziris decidi kiel prezidanto, li sentis sin morale malhelpata tion fari pro manko de plena povo.

Fine la jaro 1982 pasis. D-ro Sylla Chaves plenumis la promeson pri kio neniu dubis, ĉar estas konataj liaj altaj moralaj kvalitoj.

En la Ordinara Ĝenerala Kunsido de B.E.L., okazinta en Decembro 1981, la nuna Estraro prezentis Ĝeneralan Laborplanon por la jarkvaro 1982-1985.

Zorge analizinte la situacion de B.E.L., en la kadro de la Brazila kaj internacia Esperanto-Movadoj kaj aparte pesinte la fortojn, la nova Estraro venis al konkludo, ke estas eble daŭrigi kaj eĉ intensigi la laboron de la antaŭaj Estraroj, surbaze de la Statuto, sub jenaj kondiĉoj:

- a) trovi aktivajn helpantojn;
- b) ricevi moralan kaj materialan apogon de la Brazila esperantistaro.

La unua kondiĉo estas plenumita, ĉar kelkaj sindonaj kompetentaj samideanoj konsentis okupi postenojn en la Kontrolo kaj

Konsultiga Konsilantaroj; aliaj anoj pluoficos kiel kursgvidantoj, membro-varbantoj kaj volontulaj kunlaborantoj.

La duan la Estraro certe atingos, kiam la esperantistoj konstatos la sinceran volon labori por nia afero. La ĉi-suba Laborplano estas la unua signo de serioza intenco. Kvankam modesta, la Plano baziĝas sur la "Principaro de Frostavallen", laŭ kiu "la agado de iu ajn Esperanta Asocio baziĝas sur tri branĉoj de altivecoj: Informado, Instruado kaj Praktika Utiligo. Nur paralela, bone studita kaj celkonscia agado sur la tri kampoj povas doni kontentigajn rezultojn kun daŭra valoro".

## I. Informado

1. Regula eldonado de la oficiala gazeto "Brazila Esperantisto";
2. Eldonado de "Esperanto-Notícias" sendota al la brazila gazetaro kaj al elektitaj adresoj;
3. Eldonado de informaj folioj, sendotaj al la Esperanta gazetaro;
4. Okazigo de ekspozicioj, publikaj prelegoj, radioprelegoj laŭnecese kaj laŭeble.

## II. Instruado

1. Daŭrigo kaj intensigo de la nunaj kursoj, klasaj kaj per korespondado;
2. Starigo de klasa "porinstruista kurso".

## III. Praktika Utiligo

1. *Societaj Kunvenoj*  
Laŭblela okazigo de kulturkunveno

## 2. Biblioteko kaj diskoteko

Trovi zorganton por tiu fako cele al pliriĝo kaj diskonigo de la ekzistanta kolekto inter la membraro.

## 3. Libro-Servo

Intensigi la interŝanĝon de libroj kun aliandaj Esperantaj libroservoj por ampleksigi kaj renovigi la nunan stokon.

## 4. Naciaj kaj Internaciaj Kongresoj kaj Renkontiĝoj

Disvastigi informojn pri tiuj gravaj okazaĵoj kaj stimuli la partoprenon de membroj de B.E.L. en tiuj eventoj.

Laŭeble apogi la organizantojn de Esperanto-kongresoj kaj Renkontiĝoj.

Klopodi okazigi la 20-an Brazilan Esperanto-Kongreson.

## 5. Regionaj Renkontiĝoj

Stimuli la okazigon de ĉiujaraj regionaj Esperanto-Renkontiĝoj dum la Sankta Semajno.

## 6. Jara Kalendaro

Interkonsente kun lokaj grupoj starigi jaran kalendaron de aktivecoj.

## 7. Eldona Aktiveco

Eldoni lernolibrojn, vortarojn kaj literaturajn verkojn.

## 8. Nova Sidejo

Studi alternativajn solvojn por la problemo "sidejo de B.E.L.".

Laŭ niaj komencaj klarigoj ni perdis unu tutan jaron. Sed en la unuaj monatoj de la dua jaro (1983) ni sukcesis aperigi "Brazilan Esperantiston", regule eldoni la informilojn "Esperanto-Notícias" kaj "B.E.L. informas"; represi la verkon "Dicionário Português-Esperanto/Esperanto-Português" de C. Domingues; starigi kursojn bazan, perfektigan kaj superan; okazigi kulturkunvenojn, dissendigi radiprogramon, kaj tiel plu.

Tamen ekzistas nekontentuloj. Jam venis kritikoj, insultoj, ofendoj. Al ili ni ne respondis unue pro absoluta tempomanko, due ĉar ili fermis la demandon, kaj "la akuzito ne rajtas sindefendon".

Al ili ni prefere respondu per laboro, laboro, laboro. Sed kelkfoje ni konjektas: se apenaŭ komenciĝis nia oficperiodo jam venis tiom da kritikoj, ni supozas, ke en la fino venos minimume eksplodletero!

Ba! Al la laboro!

# LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

## Assembléia Geral Ordinária

### Resumo da Ata de 14 de outubro de 1978

Em 14 de outubro de 1978, às 15 horas, foi realizada a Assembléia Geral Ordinária da Liga Brasileira de Esperanto, na sua sede social, na Praça da República, 54 - 2º andar, sob a direção do Presidente Dr. Sylla Chaves e secretariada pelo Cel. Fernando José Galvão Marinho, Secretário Geral.

Foram tratados os seguintes assuntos:

1. Vacância de cargos na Diretoria - Pediram demissão o Secretário-Geral Luiz Alan Gomes Romero e o Segundo Secretário José Meira Mendonça. Em substituição, foram eleitos o Cel. Fernando José Galvão Marinho e Luiz Alberto de Oliveira Coelho para secretário geral e segundo secretário, respectivamente.

2. Retorno da L.B.E. à U.E.A. - O Presidente informou o retorno da Liga Brasileira de Esperanto, a partir de 1979, como instituição filiada, à U.E.A. A Assembléia indicou o Dr. Sylla Chaves para representar a Liga no 46º Congresso Universal de Esperanto.

3. Categorias de associados - A Assembléia aprovou as seguintes categorias de sócios: M-S (Membro Simpatizante) - recebe o boletim Esperanto-Notícias e tem direito de usar a Biblioteca e os serviços de livros da L.B.E.; M-1 - tem os mesmos direitos do M-S e ainda recebe os periódicos "Brazila Esperantisto" e "Brazila Kroniko"; M-2 - tem os mesmos direitos do M-1 e mais o de se inscrever em qualquer dos cursos mantidos pela Liga; DM (Dumviva Membro) - tem os mesmos direitos do sócio M-2; paga uma quota única, no ato da inscrição, válida por toda a vida.

4. Cursos - O tesoureiro Aloísio Sartorato apresentou, e foi aprovada pela Assembléia, a nova denominação dos cursos da Liga, a saber: Curso Básico (Baza Kurso), Curso de Aperfeiçoamento (Progressiva Kurso); Curso Superior (Supera Kurso) e Curso Magistral (Profesora Kurso).

Finalizando a reunião, o Presidente convidou os presentes para o programa artístico a realizar-se a seguir.

### Resumo da Ata de 31 de março de 1979

No dia 31 de março de 1979, às 15 horas, foi realizada a Assembléia Geral Ordinária da Liga Brasileira de Esperanto, na sua sede, sob a presidência do Dr. Sylla Chaves, Presidente, sendo tratados principalmente os seguintes assuntos.

Relatório e Balancete - O Presidente leu o Re-

latório da Diretoria relativo ao ano de 1978 em que se verificou que as atividades até então realizadas seguiam o plano de trabalho por ele mesmo estabelecido por ocasião de sua candidatura.

O Tesoureiro Aloísio Sartorato leu o Balance-te e apresentou uma série de gráficos que demonstraram a situação financeira da Liga.

**Membro Vitalício** – O Dr. Elmano Barbosa propôs que, para estimular o interesse dos associados, o pagamento da quota de Membro Vitalício (Dumviva Membro) fosse feito em 4 (quatro) parcelas. O Presidente prometeu estudar o assunto com os demais membros da Diretoria.

Finda a reunião, o Presidente convidou todos os presentes para a homenagem ao Dr. Lazarus Brieger e para a sessão de arte programada para aquela noite.

### Resumo da Ata de 27 de outubro de 1979

No dia 27 de outubro de 1979, às 15 horas, foi realizada a Assembléia Geral Ordinária da Liga Brasileira de Esperanto, sob a presidência do Dr. Sylla Chaves.

1. Eleição do Primeiro Secretário – Foi eleita para o cargo de Primeiro Secretário a Sra. May Bijveld, em substituição ao Sr. Antonio Eduardo Lage que pediu demissão.

2. Quotas para 1980 – Com base no orçamento elaborado pelo Tesoureiro, Dr. Aloísio Sartorato, a Assembléia estabeleceu os seguintes valores para as adesões recebidas até 30/04/80: MS - Cr\$ 100,00; M-1 - Cr\$ 400,00; M-2 - Cr\$ 800,00; DM - Cr\$ 16.000,00. Após aquela data, haverá um acréscimo de 25%.

3. 64.º Congresso Universal de Esperanto – O Presidente fez breve relatório sobre sua participação, como representante da Liga, no 64.º Congresso Universal de Esperanto.

### Resumo da Ata de 10 de maio de 1980

Foi realizada, no dia 10 de maio de 1980, às 16,00 h, na sua sede social, a Assembléia Geral Or-

#### ESPERANTOLOGIAJ STUDOJ

Eugen Wüster  
Memor-kolekto editorita  
de R. Haupenthal

Cr\$ 1.700,00

dinária da Liga Brasileira de Esperanto, presidida pelo Dr. Sylla Chaves, Presidente, e secretariada pelo Cel. Fernando Marinho, Secretário Geral.

Abertos os trabalhos, e aprovada a ata da reunião anterior, o Dr. Aloísio Sartorato, Tesoureiro, leu o relatório financeiro referente a 1979, aprovada unanimemente.

Sobre as atividades da Liga em 1979, o Presidente destacou: a) a publicação do boletim "Esperanto-Notícias", com a tiragem inicial de 6.000 exemplares; b) a redação de documentos sobre o esperanto e sua distribuição aos participantes do Congresso Postal Universal, realizado no Brasil; c) o prosseguimento dos esforços de aproximação com as demais associações esperantistas, e como fruto desta iniciativa a declaração conjunta assinada pelos Presidentes da Liga Brasileira de Esperanto e da Cooperativa Cultural dos Esperantistas; d) participação da Liga no I Encontro de Esperantistas do Nordeste, entre 12 e 15 de abril de 1979, com a colaboração da Associação Potiguar de Esperanto; e) recrutamento de voluntários para trabalhos diversos, na sede da Liga; f) reformas na sede da Liga.

Em seguida, a Assembléia indicou o nome do Dr. Sylla Chaves para o cargo de *Komitatano A* junto à U.E.A. A Assembléia também decidiu que a Liga não realizaria qualquer encontro em 1981, ano do Congresso Universal de Esperanto, mas estaria pronta a colaborar com a U.E.A. se esta vier a organizar alguma atividade desta natureza, no Rio de Janeiro.

O Vice-Presidente Prof. Walter Francini informou o lançamento, por iniciativa da Associação Paulista de Esperanto, do "Concurso Internacional de Trovas em Esperanto".

\* \*

### HONORO AL ZAMENHOF

La 11-an de Decembro 1982, en sia sidejo, Brazila Esperanto-Ligo okazigis prelegojn honore al L. L. Zamenhof. La prelegoj estis destinitaj al la ne-esperantista publiko kaj prezentis aspektojn pri la vivo kaj verko de Zamenhof. Prelegis: S-ro Antônio Rodrigues (Resuma Biografio de Zamenhof), D-ro Floriano Pessoa (Zamenhof kiel tradukisto kaj verkisto), S-ro Jair Salles (Lingvistikaj aspektoj de la Zamenhofa Verkaro), Prof. Sylla Chaves (Zamenhof kiel poeto), S-ro Amarílio Carvalho (La Interna Ideo), Kol. Jorge Campos (Zamenhof kaj lia proverbaro).

Post la prelegoj, F-ino Izabel O. Santiago regalis la ĉeestantaron per amuza muzika pupteatra prezentado kun la titolo "Verda Ĉapo".



### Minas Gerais

*Montes Claros* — La 11-an de Novembro 1981 fondiĝis Esperanto-Klubo de Montes Claros dank' al iniciato de S-ro Antonio Felix da Silva. Jen la unua estraro: Antonio Felix da Silva - Prezidanto; Wanderlino Arruda - Vicprezidanto; Walda da Rocha Athaide - Sekretariino; Antonio Rosa de Souza - Helpa Sekretario; Júlio Felix da Silva - Kasisto; Alfredo Lourenço Santos - Helpa Kasisto kaj Bibliotekisto.

### Rio de Janeiro

*Niterói* — Niterói Esperanto-Klubo elektis jenan estraron por la oficperiodo 1982-1984: Prezidanto - Joaquim do Couto; Sekretariino - Balbina Ferreira; Kasisto - Emílio Ferreira; Socia Direktoro - Marlice Botelho Belleza; Direktoro por Instruado - José Pedro Milagres.

— La 27-an de Oktobro 1982, en la Libro-vendejo Pasárgada, D-ro Mário Ritter Nunes prelegis pri Esperanto. D-ro Ritter Nunes estas membro de la Beletristika Akademio de Rio de Janeiro kaj Konsilanto de Brazila Esperanto-Ligo.

— D-ro Joaquim do Couto regule verkas artikolojn kaj notojn pri Esperanto por la periodaĵoj "Boletim Informativo" de Spiritisma Grupo Francisko el Asizo kaj "O Espírito Fluminense" de Spiritisma Federacio de Rio de Janeiro.

### Santa Catarina

*Florianópolis* — En la 28-a de Marto 1981 estis fondita Esperantista Asocio de Santa Catarina (Associação Esperantista de Santa Catarina), kun jena unua estraro: Prezidanto — D-ro Walter Boppré; Vicprezidanto — Prof. Evaldo Pauli; Sekretario por Protokoloj — D-ro Sérgio Boppré; Sekretario por Adminis-

traj Aferoj — D-ro Mauro César Goulart; Kasisto — S-ro João Sérgio Sell; Bibliotekisto — S-ro Afrânio T. Boppré.

### São Paulo

*São Paulo* — Fondiĝis en la urbo São Paulo la 1-an de Majo 1982 Esperanta Grupo Adolfo Bezerra de Menezes kun jena unua estraro por la oficperiodo 1982-1983: Prezidanto — S-ro Domingos José dos Santos; Vicprezidanto — S-ro Joel Moreira Augusto; Sekretario — S-ro Antenor da Silva Filho; Kasisto — S-ro Osvaldo Pires Holanda; Bibliotekisto — S-ro José Zacarias Filho.



### B.E.L. EN

### RADIO COPACABANA

La 17-an de Januaro 1983, la Prezidanto de B.E.L., S-ro Fernando Marinho, estis intervjuita en Radio Copacabana en Rio de Janeiro. La intervjuo komenciĝis je la 9,30 h vespere kaj dum duonhoru S-ro Marinho parolis pri Esperanto.

Sekve de tiu intervjuo, ekde la 3-a de Marto Radio Copacabana (680 kc kaj 5015 kc, je mezaj kaj mallongaj ondoj) transsendas kvinminutan programon sub la aŭspicioj de B.E.L. La programo estas transsenditaj ĉiuj-aŭde je la 11.25 h vespere kaj destiniĝas ĉefe al la ne-esperantista publiko. S-ro Joel Manso redaktas la programon, kiu ricevis la titolon "Uma ponte sobre o mundo" (Ponto super la mondo).



### LETEROJ DE

### LA LEGANTOJ

*S-ro Victor Martins*, Rio de Janeiro, RJ: ... "Sur paĝo 11-a de B.E. (n-ro 276) mi trovis preseraron sub la titolo "Vivo de Gandhi". Laŭ "Esperanto", n-ro 924, "Vivo de Gandhi" en la angla lingvo aperis en Majo 1982.

*La leganto pravas. Ni pardonpetas.*

# Lernu skribi sur sablo

Malba Tahan

Du amikoj, Mussa kaj Nagib, vojaĝadis tra la longaj vojoj ĉizantaj la malĝojajn kaj ombrajn montojn de Persujo. Ili estis noblaj kaj riĉaj Sinjoroj kaj estis sekvataj de servistoj, helpantoj kaj karavanistoj.

Iumatene ili alvenis ĉeborden de granda argilhava kaj impeta rivero. Estis nepre necese trapasi la danĝeran fluon.

Okazis, ke saltante de unu el la ŝtonoj, Mussa ne havis bonŝancon kaj falis en ŝaŭmantan akvoturniĝon.

Tie li estus mortinta se ne okazus la tuja interveno de Nagib, kiu senhezite sin ĵetis sur la fortan fluon kaj savis sian kunvojaĝanton.

Kion faris Mussa? Li ordonis al la plej lerta el siaj servistoj, ke li gravuru sur glata surfaco de ŝtonego tie staranta tiun ĉi admirindan surskribon:

*Preterpasanto!*

*Ĉi tie kun danĝero por sia propra vivo,  
Nagib heroe savis sian amikon Mussa.*

Tion farinte, ili plu iris kun siaj karavanoj tra la senfinaj vojoj de Alaho.

Post kvin monatoj, vojaĝreturne, denove renkontiĝis la du amikoj sur la sama danĝera kaj tragika loko.

Kaj ĉar ili sentis sin lacaj, tial ili decidis ripozi en la agrabla ombro de tiu ŝtonego, sur kiu estis gravurita la honora surskribo.

Sidiĝintaj ambaŭ sur la klara sablo, ili ekinterparolis.

Jen pro frivola motivo subite okazis serioza malkompreniĝo inter la du amikoj.

Ili malakordiĝis kaj diskutadis. Nagib forte ekscitita senpripense kruele vangofrapis sian amikon.

Kion faris Mussa? Kion vi farus en lia situacio?

Mussa ne venĝis al la amiko la ofendon. Li stariĝis kaj trankvile preninte sian bastonon

per ĝi skribis sur la klara sablo ĉe la nigra ŝtonego:

*Preterpasanto!*

*Ĉi tie pro frivola motivo  
Nagib profunde ofendis sian  
amikon Mussa.*

Surprizite pro tia stranga agmaniero unu el la helpantoj de Mussa respektive alparolis:

— Sinjoro! Je la unua fojo por laŭdegi la abnegacion de Nagib vi ordonis gravuri por ĉiam sur ŝtono la heroan agon kaj nun, kiam li faris al vi tian perfidan ofendon, vi kontentiĝas per simpla skribaĵo sur la ŝanceliĝanta sablo, kiel registro de tia malbona ago! La unua surskribo, ho ŝejko, restados por ĉiam kaj ĉiuj, kiuj trapasos ĉi tiun lokon, ekscios pri la okazintaĵo. La alia, skribita sur la sabla tapiŝo, antaŭ la sunsubiro estos malaperinta kiel ŝaŭmostrio inter la petolemaj marondoj.

Responde diris Mussa:

— Estas simpla la kialo. La bonfaro kiun mi ricevis de Nagib restados por ĉiam en mia koro, sed la ofendo... tiu malinda ofendo... estis skribita de mi sur la sablo, ĉar mi deziras, ke ĝi tre rapide estu forviŝita de tie ĉi kaj ankoraŭ pli rapide malaperu el mia memoro!

✱ ✱

Jen estas la sublima vero, mia amiko! Lernu gravuri sur ŝtono la favorojn kaj bonfarojn, kiujn vi ricevos, same kiel la afablajn, simpatiajn kaj kuragiĝajn vortojn, kiujn vi aŭdos.

Sed lernu skribi sur sablo la insultojn, maldankojn, perfidojn, ironiojn, kiuj vin atingos dum la marŝado tra la kruda vojo de la vivo.

Lernu gravuri tiel sur ŝtono; lernu skribi tiel sur sablo... kaj vi estos feliĉa.

(Trad. A. G. Goes)

## NOVA VERKO DE SYLLA CHAVES

La 23-an de Februaro lasta, en la libroven-dejo J. Carneiro Felipe (Pr. Botafogo, 188, Rio), Fondaĵo Getúlio Vargas, Brazilo Espe-ranto-Ligo, kaj Sonoviso prezentis al la publi-ko la novan verkon de D-ro Sylla Chaves "Kio estas Esperanto".

"Kio estas Esperanto" estas kurso kun afiŝo kaj disko kaj celas instrui Esperanton en du horoj. Per la materialo oni havas rapi-dan prezentadon de la lingvo kaj de la ĉefaj faktoj pri ĝia uzado.

Kvankam la materialo baziĝas sur la por-tugala lingvo, ĝi estas adaptebla al alilingva uzado.

\* \* \*

## anonceto

Dezirata korespondi kun brazilanoj:

- S-ro Antoni Dzimira, tajloro; adreso: Matejki 7, 44-100 Gliwice, Pollando.
- S-ro Dimitris M. Politis, 23 jara, bankoficis-to; adreso: Kolokotroni, 92, Neo Iraklio, Ateno, Grekujo.
- S-ro Vladimir Belajev, Abonement jaŝcik 29, 357600 Essentuki, USSR.

VOCABULÁRIO  
Português-Esperanto  
Esperanto-Português  
Carlos Domingues

Planejado principalmente para os cursos da Liga Brasileira de Esperanto, o Autor reuniu num só volume duas obras.

Embora se trate de obra concisa, ela será precioso auxiliar para os esperantistas expe-rientes.

Carlos Domingues foi presidente da Liga Brasileira de Esperanto e membro da Aca-de-mia de Esperanto.

Preço: Cr\$ 2.000,00

## DIPLOMOJ

Faris ekzamenon kaj ricevis diplomon  
jenaj esperantistoj:  
1979

### NORMA BAZA DIPLOMO

*Sidejo de B.E.L.*

Alceu João Batista  
Celso Martins  
Célio Freitas Martins  
Danilo Correa Rabelo  
Dina Lima Andreani  
Ely Figueira  
Elma do Nascimento  
Francelina Mantelaro Cesar dos Santos  
Humberto Marques Passos  
José Castelar  
José Meira Mendonça  
Luciana Pellegrini Drucker  
Maria Evangelina Cesar dos Santos  
Maria Rozária Jannuzzi  
Marco Aurélio Cunha  
Mônica Gomes Boller  
Ricardo Gomes de Proença  
Romualdo de Castro Celani  
Samuel da Silva  
Telmo Rangel de Alvarenga Filho  
Viviane Maria Machado Oliveira

*Associação Pernambucana de Esperanto,  
Recife, PE:*

Almir da Silva Nascimento  
Analuzia Ferreira Campos  
Daniel Dorta Moura  
Leonardo Caldas de Souza  
Maria do Socorro Brasileiro Nunes  
Maristela Arruda de Sales  
Pedro Felix do Monte Filho  
Raimundo Ferreira de Andrade  
Severino Nunes da Costa  
Zuleima Ferraz Bezerra

### PRIMICO

Poemoj

Robindronath Tagor

Cr\$ 750,00

*Associação Alagoana de Esperanto,  
Maceió, AL*

Carlos Augusto de Holanda Padilha  
Idati Barros Souza Santos  
José Abraão de Melo  
Paulo Roberto Olegário de Souza  
Maria Neide Barros Fontes  
Maria Yara de Castro da Silva  
Maria José Cavalcante de Castro  
Margarida Acácio Galvão  
Rossano Giuseppe de Arecippo  
Zuila Gomes de Araujo Correia

*Federação Espírita do Estado de São Paulo,  
São Paulo, SP:*

Antonio Sabadin da Costa  
Astrogilda Ferreira Alves  
Clara Yoshie Yoshikawa  
João Wilson Freitas da Silva  
Milton José da Silva  
Ruth Aguiar da Cunha  
Sonia Mary Ribeiro  
Valdecy Antonio da Silva

*ACESITA, Acesita, MG:*

Acyr Salgarello  
Benedito de Jesus Souza  
Dálvio Correia Mourão  
Dulce Maria Machado de Araújo  
Marco Antonio da Cunha  
Olavo Eustáquio Assunção  
Vicente de Paulo de Lana Ribeiro

*Per korespondado:*

Cantília de Barros Oliveira, Sorocaba, SP  
Cláudio Rodrigues Pistilli, Sorocaba, SP  
Carlota Picanço de Araújo, Itaboraí, RJ  
Elza Gonçalves de Oliveira, Barra Mansa, RJ  
Ivaldo Alves de Souza, Natal, RN  
Irineu Anselmo Luders, Campinas, SP  
Iva Vasconcelos Rangel, Campos, RJ  
José Pedro Milagres, São Gonçalo, RJ  
Lenio Marobin, Lajeado, RS  
Mário de Freitas Alves, São Paulo, SP  
Noemy Junqueira Passos Pereira, Uberaba, MG  
Nydia Aydos Krieger, Porto Alegre, RS  
Oswaldo Gonçalves dos Santos, Florianópolis, SC  
Paulo Bello da Costa Lima, Belém, PA  
Rubens Procópio Bário, Novo Horizonte, SP  
Sérgio Assunção, Volta Redonda, RJ  
Vanildo Ribeiro de Lyra Brito, João Pessoa, PB  
Waldemar Antonio Mendes, Patos de Minas, MG

*NORMA PROGRESIGA DIPLOMO*

*En la sidejo de B.E.L.*

Célio Freitas Martins  
Elma do Nascimento

*Per korespondado:*

José Pedro Milagres, Niterói, RJ

*NORMA SUPERA DIPLOMO*

*En la sidejo de B.E.L.:*

Fernando José Galvão Marinho  
May Bijleveld

*Per korespondado:*

Paulo Domingos Mieres Caruso, São Carlos, SP

1980

*NORMA BAZA DIPLOMO*

*En la sidejo de B.E.L.:*

Ari Gonçalves Silva  
Antonio Rodrigues da Silva  
Camillo Moreira de Souza  
Celso Firmento Born  
Célia Oliveira Pires  
Emir Corrêa da Silva  
Felismar Manoel  
Flávio Bandeira do Nascimento  
Fernando Leitão Vasco  
João Carlos Santana  
José Aélío Madureira  
Maria Célia Ávila Machado  
Pedro Albeirice da Rocha  
Roberto Odilon Horta  
Sylvio da Silva

*En Federação Espírita de Pernambuco,*

*Recife, PE:*

Cícero Fortunato  
Jacira Leal Freire  
Maria do Carmo dos Santos  
Severino Francisco de Lima  
Vilma Tavares Guimarães

*En Paraná Esperanto-Asocio,*

*Curitiba, PR:*

Espedita de Castro Feitosa  
Itacir Luchtemberg  
Maria da Conceição Feitosa Jurca  
Paulo César Sartor de Oliveira  
Salvador Raymundo

**HAJKO (sen verboj)**

**Diderto Freto**

Por la homaro,  
pere de Esperanto,  
mondo sen baro!

*Per korespondado:*

Anivaldo Macedo Paiva, Brasília, DF  
 Custódio Rodrigues de Moraes, São Paulo, SP  
 João Sérgio Sell, Palhoça, SC  
 José Antonio Schiavinati, Ferraz de Vasconcelos, SP  
 José Danime, Conselheiro Lafaiete, MG  
 José Magalhães Braga, Campina Grande, PB  
 Jorge Luiz Cândido do Amaral, Natal, RN  
 Joaquim de Carvalho, Piracicaba, SP  
 Ronaldo Gomes de Menezes, Caruaru, PE  
 Teresinha de Souza Casson, São Paulo, SP  
 Uriel Carvalho de Oliveira, Potirendaba, SP  
 Vâmer Marlière Arruda, Juiz de Fora, MG

**NORMA PROGRESIGA DIPLOMO***En la sidejo de B.E.L.:*

Ayesha Leitão Vasco  
 Celso Martins  
 Cláudio Zimmermann  
 Marcos Franco Arruda  
 Sylvio Malheiros

*Per korespondado:*

Antonio de Souza Barbosa, Volta Redonda, RJ  
 Hélio Fontoura Aderne, Belo Horizonte, MG  
 Idati Barros Souza Santos, Maceió, AL  
 José Leal Ferreira, Matarandiba, BA  
 Lenio Marobin, Lajeado, RS  
 Maria José Cavalcante de Castro, Maceió, AL  
 Maria Neide Barros Fontes, Maceió, AL  
 Noemy Junqueira Passos Pereira, Uberaba, MG  
 Oswaldo Gonçalves dos Santos, Florianópolis, SC  
 Olsen Bento da Cruz, Curitiba, PR  
 Zuila Gomes de Araujo Correia, Maceió, AL

**NORMA SUPERA DIPLOMO***En la sidejo de B.E.L.:*

Celso Martins  
 Marcos Franco Arruda

*Per korespondado*

Walter Boppré, Florianópolis, SC

## SERVIÇO DE LIVROS

|                                                                                                                                                    |          |
|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|----------|
| La Amo de Danto Alighieri, Trygve Müller. Drama teatraĵo en kvin aktoj . . . . .                                                                   | 1.000,00 |
| Ĉiela birdo, Zsigmon Móricz. Trad. D-ro István Nagy. La aŭtoro dum pli ol tri jardekoj ludis centran rolon en la hungara literatura vivo . . . . . | 550,00   |
| Animo Prisma, Sylla Chaves . . . . .                                                                                                               | 150,00   |
| Apontamentos de Esperanto. Ed. Associação Portuguesa de Esperanto. Coleção de artigos publicada na Revista Portuguesa de Esperanto. . . . .        | 700,00   |

# Ĉu tutamerika

## Esperanta periodaĵo

### estas efektivigebla?

Bernard Golden

En scienca revuo pri prahistorio eldonita en Italujo, mi legis pritrakton de la problemo de revu-eldonado en tiu fako. La redaktoro-arkeologo plendis, ke en la lastaj jaroj okazis inflacio de periodaĵoj en Italujo sur la tereno de la prahistorio. Li klarigis, ke eĉ en la plej bonaj kazoj, nur po 300-400 ekzempleroj de ĉiuj tiuj periodaĵoj vendiĝas. Tamen, oni eble presigas 1000-2000, kaj la ne venditaj ekzempleroj restas en subtegmentejo. Tiuj revuoj ne povas pluvivi sen subvencioj kaj ili ne povas honeste pravigi la propran ekziston. Malgraŭ tio, ili petas kaj akiras elspeson de fondo de la ŝtato, de lokaj administracioj kaj de privataj. Laŭ la opinio de tiu redaktoro, kiam revuo ekzistas dum dek jaroj kaj ne atingas 1000 legantojn, tio signifas, ke la publiko ne akceptis ĝin, kiel ajn meritplena ĝi estas.

Por eliri el tiu malkuraĝiga situacio, li proponas kunfandon de pluraj publikigaĵoj tiel, ke pli da ekzempleroj povas esti presitaj je malpli alta kosto. Oni, do, organizas la disvastigon de informoj en malpli da revuoj. Kooperativo povas eldoni ses aŭ dudek numerojn en unu jaro. Ĉiu povas havi sian apartan aspekton, eĉ kun malsama titolo kaj diversaj redaktoroj, se tio estas absolute necesa, por ke ĉiuj estu kontentaj, sed kun komuna abono por ĉiuj. Tiu ĉi revuo altiĝos rapide al 10-12 mil ekzempleroj, ĉar unuiĝas ĉiuj abonoj. Ĉiuj ricevos la informojn, elspezante malpli, kaj la informoj estos alireblaj pli vastskale.

Kiel estas aplikeblaj al Esperantaj periodaĵoj la rekomendoj de la redaktoro de tiu itala scienca revuo? Tuj venis en mian kapon la

konstato, ke simila situacio ekzistas en multaj regionoj de Esperantujo. Fakte, kelkaj homoj argumentas, ke estas superfluaĵoj, gazetoj, bultenoj kaj novajletoj *ĉie* en Esperantujo nuntempe. Kio estas bezonata, ili senĉese marteladas, estas ne *pli* da periodaĵoj, sed *pli bonaj* periodaĵoj, ĉiu dediĉita al specifa temo aŭ interes-sfero. Sed malofte venas konkretaj kaj praktikaj proponoj por atingi tiun celon. Mi deziras pritrakti en tiu ĉi artikolo eblecon kunfandi plurajn periodaĵojn en limigita teritorio, Ameriko.

Laŭ la *Jarlibro* de U.E.A. por 1979 kaj la samjara Marta numero de *Esperanto*, mi kompilis statistikojn pri la Esperanto-movado en la Nova Mondo. Dek du landoj havas organizitan landan movadon; Brazilo havas du landajn movadojn, kaj kvin landoj havas apartan junularan organizaĵon. Cetere, membroj de U.E.A. troviĝas en sep landoj sen organizita movado. En Nord - kaj Sudameriko estas entute iom pli ol 3000 anoj de U.E.A. Al tiu nombro oni devas aldoni aliĝintojn de aliaj organizaĵoj, ekzemple *La Sennacieca Asocio Tutmonda* (S.A.T.) kaj la *Neŭtrala Esperanto-Movado* (N.E.M.), kiuj plej verŝajne ne superas cent. Certe estas en pluraj lokoj ankaŭ esperantistoj ne apartenantaj al la organizita movado, sed tute ne eblas scii, kiom da homoj troviĝas en tiu kategorio. Ni uzu la ciferon 3.000, kiu ja estas realisma. Naŭ periodaĵoj estas publikigitaj en ses landoj (Brazilo havas tri kaj Kanado du). Landaj organizaĵoj en la aliaj ses landoj ne havas sian propran organon.

Nu, oni pensu pri kio povus okazi, se 3000 homoj abonas unu solan periodaĵon. Se la naŭ ekzistantaj revuoj kaj bultenoj havas almenaŭ po ok paĝojn, post kunfando la rezulto estus impona revuo kun 72 paĝoj, kiu povus aperi monate aŭ almenaŭ dumonate. Ĉiuj nunaj sperthavaj redaktoroj preparus informojn pri sia landa movado same kiel kutime, sed en tia ampleksa revuo ili havus la eblon redakti ankaŭ plurajn specialajn rubrikojn. Krome, estus loko por detale pritrakti lingvajn problemojn, aperigi beletraĵojn, kaj evoluigi la lingvon en tute novaj fakoj.

Tiu ĉi sistemo de tutkontinenta kunlaborado eble solvus ankaŭ financajn problemojn,

kiujn pluraj redakcioj daŭre alfrontas. Oni povus elekti kiel eldonlokon landon aŭ urbon, kie la revuo estus kompostita kaj presita je la plej malalta kosto. Ekspedado de la revuo nepre devus esti per aerpoŝto.

Eble tiu ĉi pritrakto stimulus iom da pensado kaj diskutado pri la temo, kaj eble la unua numero de *La Amerika Stelo* aperos okaze de la centjara jubileo de Esperanto en 1987.



## NEKROLOGO

Carlos Torres Pastorino

Carlos Juliano Torres Pastorino naskiĝis la 4-an de Novembro 1910. Fininte siajn mezgradajn studojn en Colégio Pedro II, junaĝa li vojaĝis al Italujo por enskribiĝi en Seminario, kie li recevis diplomon en Minora Ordeno de la Tonsuro; en 1932, diplomiĝis pri Filozofio kaj Teologio; en 1934, fariĝis pastro. Post kelkaj monatoj li rezignis la pastrecon kaj revenis al Brazilo, kie li sin dediĉis al la ĵurnalismo kaj al la instruado de Psikologio, Logiko, Historio de Filozofio, Latina kaj Greka Lingvoj.

En 1953, Pastorino eklernis Esperanton kaj baldaŭ regis la lingvon. En kunlaboro kun Jorge Soares das Neves li publikigis la lernolibron "Método Elementar de Esperanto" por la radiprogramo "Esperanto, Língua Internacional", kelkajn jarojn dissendita per Radio Ministerio de Edukado kaj Kulturo.

De 1970 Pastorino loĝis en Brasília, kie li mortis la 13-an de Junio 1980.

## CANAÃ EM ESPERANTO

Muito breve aparecerá em esperanto *Canaã*, conhecida obra de Graça Aranha, em magnífica tradução de Antonio Caetano Coutinho. Devemos a iniciativa da edição ao Dr. Lauro Coutinho, filho do tradutor.

# MOZA IKO

## Krucovorto (de Lacy)

|    | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
|----|---|---|---|---|---|
| 1  |   |   |   |   |   |
| 2  |   |   |   |   |   |
| 3  |   |   |   |   |   |
| 4  |   |   |   |   |   |
| 5  |   |   |   |   |   |
| 6  |   |   |   |   |   |
| 7  |   |   |   |   |   |
| 8  |   |   |   |   |   |
| 9  |   |   |   |   |   |
| 10 |   |   |   |   |   |

**Horizontale:** 1. Rapidega; 2. Devigi iun al io malagrabla (inverse); 3. Estrado; 4. Flava; 5. Uĝe loga; 6. Mone prunte (inverse); 7. Malfrua; 8. Kant-melodio; 9. Scienca vortkomenco; grandega; 10. Kvincifera nulo.

**Vertikale:** 1. Dikhaŭta parhufulo; 2. Pasiĉe ami; tropika birdo; 3. Kontinento; 4. Dekono de la duoblo de dek kvin; evitemo paroli pri seksaj aferoj; 5. Iom libera kompensistemo; ducifera nulo.

## Pensoj

Trad. V. Inglada

Historio estas prijuĝo de Dio. — Esquiros.  
Ĉiu venko nenecesa estas krimo. — La Harpe.

Preskaŭ ĉiuj agoj de politikuloj devenas de virinoj. — De Girardin.

Vero estas filo de la tempo. — Gelio.

Espero estas sonĝo de homo maldormanta. — Aristoteles.

Homo ne trovas ripozon sur la tero; por ĝin trovi estas necese meti teron sur homon. — Selles.

## Dek konsiloj Je Jefferson por la praktika vivo

1. Prokrastu neniam ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ.

2. Ne trudu al alia persono laboron, kiun vi mem povas plenumi.

3. Ne elspezu monon pli frue, ol vi ĝin posedas.

4. Aĉetu neniam tion, kion vi ne bezonas.

5. Evitu la fieron, ĝi malutilos vin pli multe, ol la malsato, soifo kaj malvarmo.

6. Neniam bedaŭru, ke vi tro malmulte manĝis.

7. Kion vi faras, faru volonte.

8. Ne maltrankviliĝu pri la malbonoj, kiuj okazos neniam.

9. Rigardu la aferojn ĉiam de ilia bona flanko.

10. Kiam vi koleras, kalkulu ĝis dek, antaŭ kiam vi parolos; se vi estas tre kolera, kalkulu ĝis cent.

(Trad. D-ro Kabe)

## Ridu, ni petas

— Tiu simio iel similas la avon, ĉu ne patro?

— Silentu, kara. Ne parolu tiel malĝentile.

— Sed la simio ne povas kompreni, ĉu?

## Nekonata Fluidaĵo

Kuracisto — Ĉesu trinki alkoholaĵon! Alie ĝi baldaŭ mortigos vin. Se vi volas resaniĝi, vi devas nepre trinki nur akvon.

Paciento — Akvo? Akvo? Ho jes, nun mi rememoras! Ĉu tio ne estas la fluidaĵo, kiun oni vidas sub la pontoj?

**Solve:** Horizontale — 1. Hasto; 2. Idurto; 3. Aĉeto; 4. Ora; 5. Pimpas; 6. Falo; 7. Tarda; 8. Arto; 9. Makro; 10. 00000. Vertikale: 1. Hipopotamo; 2. Adoro; 3. Sudameriko; 4. Tri; 5. Pudoro; 6. Silento; 7. Simio; 8. Simio; 9. Simio; 10. Simio.